

Heinrich Heine,
Lorelej

*tradukita de Ludwig Lazarus
Zamenhof*

Heinrich Heine,
Lorelej'

tradukita de Leopold Elb

Heinrich Heine,
Lorelejo

tradukita de Joachim Gießner

Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la originala traduk-versio de Leopold Elb.

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l'sun' en vespero
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto ŝi sidas,
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l' pura aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,
ŝipisto ekstremis de l' kanto,
kaj blinda por ĉiu danĝero
rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela
perdiĝis sub l' akvoturnado;
ĝin Lorelej' faris kruela,
per sia mirinda kantado.

...

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,
Fluadas la Rejn' en trankvil',
La supro de l' monto lumiĝas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas
Ŝipisto dum sia vetur';
Rifaron li ne priatentas,
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronos finfine
Ŝipisto kun sia boat',
Kaj tion kaŭzis feine
La Loreleja kantad'.

...

Malgajon mi sentas en koro,
sed kial tia tim' ?
Legendo el pratempa foro
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,
kaj malvarmetas l' aer'.
Sed brilas la mont' en orbelo
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

Ŝipiston en eta boato
Turmentas koremoci'.
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,
rigardas nur supren al ŝi!

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo
la ondoj lin kun boat'.
Nun kuŝas li en la profundo
pro Loreleja kantad'.

...

Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazararo Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto “Mia kantaro I”, eldonita de Josef Schiffer (Wilstorffstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo “Fervoja Esperantisto” de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.